



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIG HOMA
ESTAS AL NI FREMO

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO
EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO.

Kulturaj Kajeroj

E. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj | 13, boulevard de la Chauvinière

Bonfara : 12 fkoj | 44 - Nantes

P.C.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1968

2

KULTURAJ KAJEROJ

1968

MARTO-APRILLO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAVO

El Gresillon

Karaj geamikoj.

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Okaze de la 60-a Nacia Kongreso

Arles

F. Garrigues

Rabelais, diboĉulo aŭ klerulo (II)

J.-P. Guillot

Top-Sekreto de la venenoj

R. de la Taille

100-jara jubileo de A.-M. Gorkij

Blanka floro

A. Logvin

Monologo :

La morto de l'kato

M. Špicer

Por via distro

Nia Konkurso

P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

EL GRESILLON

Karaj geamikoj,

Ankaŭ ĉijare la Esperanto-Domo Gresillon kalkulas pri vi. Ĝi atendas vin, konatulojn kaj nekonatulojn. Ne pli feliĉa ĝi estas ol kiam ĝi akceptas sub ĝia tegmento multajn geamikojn, eĉ kiam kelkaj komence mutas, balbutas aŭ « krokodilas ». Ĝi bone scias, pro longa sperto, ke eĉ la timemuloj tre rapide « degelas », tiom varma estas la akceptado. « Izolulo » estas vorto tute nekonata en la Grezijona lingvo. Do venu !

Kion vi faros ? Vi elektos inter laboro kaj ripozo. Ni pretigis por vi kursojn, kiuj ebligas vin eklerni, plulerni aŭ elflerni la lingvon. Vi povos aŭskulti D-rojn Lapenna kaj Zlatnar, S-rojn Thierry, Sekelj, Dobrynski kaj Becker, kaj partopreni en la Libera Tribuno, kies ĝenerala temo estos « Modernaj Formoj de laboro en la nuntempa Esperanto-movado ». Vi povos ankaŭ vi-

ziti la regionon, la Loire kastelojn, la belajn urbojn Angers, Le Mans kaj Nantes. Vi povos distriĝi ĉar ne nur laboron ni proponas al vi, sed ankaŭ paroladetojn kun kolorbildo, filmojn, ludojn, dancojn. Vi povos promeni en la parko, en la ĉirkaŭaĵo, al la dolmeno. Vi povos baniĝi, fiŝkapti. Aŭ, tute simple, kuŝiĝi sur la herbejoj rigardante la ĉielon. Do, venu !

Ĉio estas preta. Vi povas veni. La homoj pretigis lokon kaj programon. La arboj elektis siajn plej allogajn verdkolorajn vestaĵojn. La floroj instaligis en la taŭgaj lokoj. La birdorkestro ĉiutage provkantas por prezenti sian plej belan someran koncerton. Ne seniluziigu ilin. Venu diri al la arboj, al la floroj, al la birdoj, ke vi ŝatas ilin. Venu danki ilin. Ĉar nur por vi ili faris sin tiel belaj. Ne nur la homoj senpacience atendas vin. Do, venu !

NIA PROGRAMO

de la 30-a de Junio ĝis la 21-a de Julio :

Kursoj (S-ro Ribot) - Ekskursoj - Ekzamenoj.

de la 22-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto :

ĝis la 27-a : SEMINARIO de UEA.

« Modernaj Formoj de laboro en la nuntempa Esp-movado » kun partopreno de D-roj Lapenna kaj Zlatnar, S-roj Becker, Dobrynski, Sekelj kaj Thierry.

ĝis la 4-a : Diverstemaj prelegoj - Ekskursoj.

de la 4-a ĝis la 25-a de Aŭgusto :

Kvar kursoj - Ekzamenoj - Fotoarto, bindado, korbofarado - Ekskursoj.

de la 25-a de Aŭgusto ĝis la 8-a de Septembro :

Kursoj - Ekzamenoj - Ekskursoj.

Poste : Ripozo.

Petu informojn : Gresillon, 49 - BAUGE, Francujo.

Esperanto tra la Mondo



SOMERAJ MANIFESTACIOJ :

— FERIAJ kursoj en Helsiŝg6r : kvar diversaj internaciaj kursoj, de la 21a ĝis la 28a de julio en Danlando. Skribu al Sro L. Friis, Ingemannsveg 9, DK 8230, Abyh6j (Danlando). Aŭtune, aliaj kursoj en Aarhus (13-19a de oktobro).

— Somera Universitato en Gyula (Hungario), 6-13a de julio, kun altnivelaj prelegoj kaj distrajoj. Adreso : Somera Esperanto-Universitato, Petofi ter 3, Gyula, Hungario.

— Internaciaj ferioj en la Roza valo (en Pavel Bania), Bulgario. Du periodoj : 5-15 kaj 20-30a de junio.

— Sub la patronado de Mondpaca esperantista movado : Semajno de Internacia Amikeco, en Plzen, Cefioslovakio, 16-23a de junio. Adreso : Zk-Roh Skoda, Kopec-k6ho sady 13, Plzen.

— Semajno de la Balta Maro, en Germana Demokrata Respubliko, en Rostock, 7-14a de julio. Adreso : Esperanto-grupo, Kulturbund, Kr6peliner str. 25, 25-Rostock, DDR.

— Renkontiĝo por esperantistaj naturamikoj, 20-30a de julio, en Abaliget (Hungario). Adreso : R.E.N., P6cs 1, p6stfako 2, Hungario.

— Eŭropa Ferio-Semajno, en Gwatt, ĉe la lago de Thun, Svislando 25-31a de aŭgusto. Adreso : Sro Ernst Gl6ttli, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg (Svislando).

— Internacia Esperanto-Semajno, 18-25a de julio, en Romans, Francio. Adreso : Esperanto-Federacio, 31 strato P6cherie, F-26 Romans.

— Seminario, sub aŭspicioj de U.E.A., en la esperantista Kulturdomo de Gr6sillon, 49-Baug6, Francujo, 22a de julio - 1a de aŭgusto. Kun Prof. Lapenna, Jean Thierry, Tibor Sekelj, Dro Zlatnar, Gŭnther Becker, Hans Bakker.

— Internacia Geografia Semajno, 11-17a de aŭgusto, en Bilbao (Hispanujo). Deko da prelegoj pri la temo : « Geografiaj esploroj en nia epoko » kaj interesaj ekskursoj. Adreso : Grupo Esperantista de Bilbao, Barren-calle-Barrena 7, 1^o dcha, Bilbao 5, Hispanujo.

— Instruista konferenco, en Sonnenberg, Germanujo (20-29a de septembro). Adreso : Sro H. Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, Germanujo.

EL POLLANDO :

— Laŭ nova decido de la Pola Ministerio de Klerigo kaj Superaj Lernejoj, ĉiuj lernejoj unua — kaj dua — gradaj, kiuj decidis enkonduki la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto, devas sekvi la oficialan instru-programon preparitan de Pola Esperanto-Asocio kaj ĵus aprobitan de la Ministerio. La aprobo de la instru-programo estas nova sukceso en la batalo por akceptigi Esperanton, kiel egalrajta kun aliaj instruobjektoj.

EL FINNLANDO.

— Universala Esperanto Asocio elektis, kiel kongresurbon por 1969 Helsinko, Finnlando. Antaŭ — kaj post — kongresaj aranĝoj estas antaŭvidataj en Svedujo kaj Soveta Unio. La Universala Kongreso okazos de la 26a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1969.

POR LA GEJUNULOJ :

— La 6a « Essex International Jamboree » havos esperanton, kiel duan lingvon. Ĝi okazos de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto, en Belchamps, Hawkwell ĉe Southend. Esperantistaj skoltoj, partoprenu ! Petu informojn de Barrie Clarck, 23, Wordsworth Road, Coventry kaj rilatu kun la sekretario de Skolta Esperanto-Ligo, Sro Hammer J.K., Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

— Por esperanto-kursoj en labortendaroj, TEJO bezonas junajn esperantistojn, kiuj tre bone regas la lingvon kaj estas pretaj instrui ĝin. Krome estas bonvenaj junaj helpantoj esperantistaj (labortendaroj en Francio kaj Nederlando). Informoj donas Fino J.-M. Liouville, 6, rue L6on-Vaudoyer, 75-Paris 7^e.

— La raporto de « Programo pasporto » indikas, ke jam 50 gejunuloj anoncis sin por esti gasto kaj ke 28 familioj anoncis sian pretecon gastigi ilin. Skribu por informo al R. Feldman, Bv. 866-A Rosario, Argentino.

ELDONAJOJ :

— Resumoj en Esperanto — apud aliaj lingvoj — enkondukis la anglalingva revuo « Medicamundi ». La revuon dediĉitan al radiologio kaj parencaj fakoj, eldonas la firmo Philips, en Nederlando.

— La eldonejo « Stafeto » publikigis « Okuloj », altnivelan novelaron de nia talenta verkistino Marjorie Boulton.

— « La Mondpercepto de la modernaj natursciencoj ». Tiu libro entenas la prelegojn de la 10a internacia seminario de Germana Esperanta Junularo. Ĝi estas grava kontribuado al la scienca literaturo en esperanto.

— Denove « Kio estas spiritismo » de A. Kardec, kondenso de la doktrino de spiritismo.

— La grandformata disko « Jen nia mondo » (kantoj de la usonanoj Bob Dylan kaj Pete Seeger, kantitaj de « Duo Espera »), estas denove havebla post dua eldono (33 r/m, 30 cm. kun tekstoj).

— Regule aperadas la monata « Heroldo de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanta Asocio ». Adreso : P.K. 25, Sofia, Bulgario.

— Ankaŭ la Italaj Ŝtataj Fervojoj uzos de nun la internacian lingvon en sia horaro, aldonante ĝin al la aliaj jam uzitaj lingvoj.

JARO DE HOMAJ RAJTOJ.

— En la kadro de la jaro de Homaj Rajtoj, organizita de Unuiĝintaj Nacioj, U.E.A., kunlaborante en tiu agado, reeldonis la esperantan tekston de la Universala Deklaracio kaj senpage liveras ĝin. Krome, la revuo « Esperanto » publikigis en februaro kaj marto, artikolojn pri la persekutoj kontraŭ la internacia lingvo, en diversaj landoj.

POR LA MEMBROJ DE LA FRANCA PACMOVADO :

— La gazeto « Combat pour la Paix », organo de la franca « Mouvement de la Paix », publikigis tutan paĝon pri esperanto. La francaj esperantistoj, anoj aŭ simpatiantoj de tiu movado povas aliĝi al « Franca Esperantista packomitato », adreso : Sro Jean Dalet, 79 bis, rue du Ch6teau, 92-Asni6res, Francio.

Internacie, « Mondpaca Esperantista Movado » publikigas, alternative en diversaj landoj, la gazeton « Paco ». Redaktoro : Sro Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37-St-Symphorien, Francio.

Okaze de la 60-a Kongreso de U. F. E. en Provenco

ARLES

*O ci, kiu estis ĉio, kion oni povas esti,
La Metropolo de Imperio,
La Ĉefurbo de Reĝlando,
Kaj la Madono de Libereco.*

Frederiko Mistral.

Tiuj paroloj de la provenca majstra verkisto, Mistral, permesas aserti ke, trairante Arles'on, ni kontaktiĝas kun la tuta historio de tiu regiono.

La unuaj loĝantoj konataj, la Liguroj, starigis apud la urbo, en la praepoko, meze de la tiamaj marĉoj nun malaperintaj, menhiron sur la monteto « Cordes » (Pr. Kord').

La klimato, la pejzaĝo strange memorigas Italujon. Ili allogis la Romianojn. La regiono fariĝis « Provincia Romana », sekve ĝia nomo : Provenco. Arles profitis tiun allogon. Frue granda haveno, tre aktiva dank'al sia situo sur Rodano, proksime de la maro, ĝi kunligis Hispanujon kaj Gallion kun Italujo, pere de la grandaj vojoj Aŭrelia kaj Domitia. Ĝi komercis kun ĉiuj mediteraneaj urboj, vendis la tritikon de Comtat Venaissin (Venecia Grafejo), la oleojn de Provenco, la rodanajn vinojn. En la ŝipfarejoj, oni senhalte laboris. Ĉar ĝi situas apud la enfluejo de Rodano, amasoj da varoj akumuligis sur la bordoj de la riverego. Ili venis de ĉiuj mediteraneaj havenoj, el Oriento, Grekujo kaj Afriko. Dokistoj ilin malŝargis el la ŝipoj, kaj, tuj, enŝipigis ilin sur aliajn malpli grandajn por transportado ĝis la plej internaj partoj de la lando. Oni parolis ĉiujn lingvojn tiam konatajn. Oni renkontis ĉiaspecajn homojn kun la plej strangaj kostumoj : komercistojn, maristojn, soldatojn venantajn el la plej malproksimaj partoj de la antikva mondo.

La urbo estis eleganta, kun sia amfiteatro, sia teatro, siaj monumentoj el marmoro, siaj belaj statuoj. La loĝantoj kuniĝis sur la vasta Forumo, la koro de la urbo. Sur ĝiaj kahelegoj, blindetigitaj pro la suno, ili promenis, kontraktis aferojn, interŝanĝis novaĵojn. Pluraj tem-

pluj, starigitaj je la honoro de la dioj kaj de la imperiestroj, ricevis piaĵojn de la popolo.

Pura akvo alkondukita per multekosta akvodukto atestas la rafinojn de la tiamaj Arles'anoj, kiuj jam ne volis trinki la akvon de Rodano. Aldonu bluan ĉielon, tian sunon vivigantan la kolorojn : vi havas spektaklon prezentitan de neniu alia urbo.

Arles konis sian veran apogeon nur dum la dekadenco de la romia imperio. Imperiestro Konstantino restadis en la urbo. Ĝi lin allogis, memorigis al li Romon pro sia situacio, sia milda klimato, siaj afablaj loĝantoj, posteuloj de la veteranoj venigitaj antaŭ tri jarcentoj de Cezaro, konservinte siajn kutimojn. La elekto de la Imperiestro pligrandigis la potencon de la urbo, kies prestiĝo ĉiutage kreskis.

La urbo pliriĉiĝis, pligrandiĝis. Oni konstruis novajn monumentojn. Ili ĉirkaŭis la publikajn placojn. Ponto el ŝipoj kunigis la du bordojn de Rodano. Nova kvartalo kreskis sur la dekstra bordo. Luksegaj varmbanejoj eĉ donis sian nomon al kvartalo.

La filo de Konstantino, naskiĝis en Arles, en 314. Tiu, poste restadis en la urbo. La ludoj, la festoj konis neordinaran brilon. La kuroj en la cirko, la teatraj prezentoj estis belegaj. Neniam la urbo konis tian epokon, tiel vivoplenan, tiel gajan. La tuta Imperio ĝin rigardadis. Oni ĝin nomis : « Galla-Rometo ».

La multaj tomboj borderantaj la malnovan Aŭrelian vojon formis la nekropolon « Elizeaj Kampoj ». Tie, tuj de la kvara jarcento, la nobeloj, la riĉuloj, sin entombigis. Iliaj ĉerkoj sekvis malrapide la fluon de Rodano.

Kiam la Romia Imperio ruiniĝis en la anarkio kaj la invadoj, Arles konservis ankoraŭ grandan rolon. Ĝi fariĝis ĉefurbo de sendependa reĝlando. Tiel, Arles dufoje konis la apogeon de

sia gloro, dufoje ĉefurbo. Ĝi iomete konservas la nostalgion de tiu pasintaĵo pere de siaj monumentoj. La antikva profilo de ĝiaj filinoj, la stilo kaj la harmonio de iliaj kufo kaj kostumo memorigas tiun epokon.

Unu el la unuaj, la urbo konis la komunumajn instituciojn. Ĝi profitis tre imponan kaj larĝan senimpostecon dum epoko, kiam la franca lando konis la teruran feŭdismon. Ĝi eĉ fariĝis respubliko, ĝis 1486, kiam ĝi estis definitive aneksita al franca krono. La franca asimilado ne estis tre facila kaj postulis multajn jardekojn. Hodiaŭ, ankoraŭ, la provenca lingvo estas parolata de ĉiu Arles'ano, inda je sia deveno.

La preĝejo « Sankto-Trofimo », konstruita dum la XIa kaj la XIIa jarcentoj, staras en la angulo de la placo. Ĝia kradeĝo prezentas la finan juĝon. En la timpano Kristo prezidas la Sanktan Manĝon. La dek-du apostoloj sidas sub liaj piedoj ; en la maldekstra friso la beatigitoj akceptataj en Paradizo, en la dekstra, vi vidas la malbenitojn. En la apuda klostro, unu el la plej belaj en Francujo, vi rimarkas la diversecon kaj la nombron de la statuoj, kapituloj, kolonoj.

Forirante el la klostro, turnu dekstren ĝis la antikva teatro, greko-roma. Ĝi povis enteni 12.000 rigardantojn kaj ankoraŭ montras siajn majestajn ruinaĵojn : belegajn ĝemelajn kolonojn el marmoro, kiuj subtenas parton de la kornico kaj stumpojn de du aliaj, antaŭe simetriaj

al ili, luksega dekoracio por nunaj mire belaj prezentadoj.

Je kelkaj metroj, oni ekvidas la imponan amason de la Amfiteatro, pli popole nomita Arenoj. Konstruita dum la la kaj la Ila jarcentoj, ĝi povis enteni 25.000 personojn. Ĝi estas nun la plej granda en Francujo. Dek-kvin mil rigardantoj povas sidi sur ĝiaj ŝtupbenkoj. Supreniru ĝiajn saracenaĵajn turojn, vi havos belan perspektivon al Rodano, Kamargo, Alpiĵoj, Kraŭo..

Revenu al placo Respubliko. En la kontraŭa angulo, iru laŭ la strato Respubliko, ĝis la « Muzeo Arlaten » (leg. Arles'ana Muzeo). Per la mono de Nobel Premio, kies laŭreato li estis en 1904, Frederiko Mistral ĝin kreis. Juvela restarigo de la pasinteco interna kaj familia de Provenco, la « Muzeo Arlaten » estas unu el la plej interesaj folkloraj muzeoj en Francujo, kun siaj portretoj, kostumoj el la diversaj epokoj, mebloj, bestoj, nenombreblaj iloj, pentraĵoj de Leo Lelée, la mastro de la arlesanaj siluetoj.

Por fini la viziton, iru promenante, laŭirante la belegan promenadon « Lices » (pr. Lis'), sub la milda ombro de ĝiaj mikokuloj, ĝis la Nekropolo Alyscamps (« Elizeaj Kampoj »). En la tuta gallo-romia tombejo, vi povos ripozi kaj mediti, apud la tombo de iu riĉa prapatro.

F. GARRIGUES.



Ĉu vi sendis vian reabonon ?

Ĉu vi abonigis amikon ?

Ne plu atendu

Adresoj de perantoj sur la lasta kovrilpaĝo

P. BABIN -- 44 - NANTES

p.k. Nantes 281361

RABELAIS,

DIBOĈULO AŬ KLERULO ? (II)

Nur rapida trarigardo de unu el la verkoj de Rabelais, kiel ekzemple « Gargantua », donas ideon pri la verkisto. Tuj aperas, ke li multege ŝatas la vivon, la simplan vivon de la kamparanoj, kaj popolanoj. Tuj aperas ankaŭ, ke tiu amo de la simpleco estas la rezulto de longa studado kaj pensado pri la homoj. Oni vidas rapide, ke li tute ne estas ĝenata kiam temas pri « pli altnivelaj » aferoj ; li tre facile povas paroli pri filozofio, medicino ; li volonte montras kiel regas la bona reĝo, kaj kiel agas la stulta reĝo. Lia kono pri « militarto » aspektas serioza, kiam li montras, ke forto ne ĉion povas, ke ankaŭ ruzo devas esti uzata.

Tiu unua impresio, instigas al pli profunda studo de lia verko, kaj de lia vivo. Ni unue aŭskultu la mediciston :

« La intenco de la fondinto de tiu et-mondo, estas konservi en ĝi la animon, kiun li metis. La vivo konsistas el sango, la sango estas la loko de la animo. Unu nura laboro, tamen, lacigas tiun mondon : ĝi daŭre forĝas sangon. En tiu forĝejo, ĉiuj membroj havas sian propran oficon, kaj ilia organizado estas tia ke, senĉese unu prunteprenas de la alia, unu pruntedonas al alia, unu ŝuldas al alia, la materialo estas konvena metalo por iĝi sango, ŝanĝita kaj donita de Naturo. Pano, kaj Vino : en tiuj du estas entenataj ĉiuj specoj de nutraĵo. Por ilin trovi, pretigi, kuiri, la manoj laboras, la piedoj marŝas kaj portas la tutan maŝinon, la okuloj ĉion kondukas.

« La apetito, je la enirejo de la stomako, dank'al iom da « amareta melankolio » eldonita de la « ratelle » petas la enmetadon de la « viandon », la lango ĝin provas, la dentoj ĝin maĉas, la stomako ĝin ricevas, kaj fluidigas, la vejnoj « mezaraiques » elsuĉas tion, kiu estas bona kaj konvena, forlasante la fekaĵon, kiu, per konvena tubo, estas elĵetita, kaj portas ĝin al la hepato, kiu ĝin ŝanĝas en sangon.

« Tiam, laŭ vi, kia estas la ĝojo de tiuj oficistoj, kiam ili vidis tiun oran rivereton, kiu estas ilia nura restoracio? Ne pli granda estas la ĝojo de la Alhemiistoj, kiam post longaj laboroj, grandaj penoj kaj elspezoj, ili vidas la metaloj, kiuj ŝanĝiĝas en iliaj fornoj... ».

Tiu « kurso » pri medicino, fakte, ne finiĝas ĉi-tie. Rabelais tre longe parolas pri la vivo de la homa korpo, kaj, tiamaniere, montras, kiel granda estis lia kono pri ĝi. Tre verŝajne, li estis la unua medicisto, kiu kuraĝis malfermi korpon de mortinta homo por montri al siaj lernantoj ĉiujn organojn, kaj klarigi iliajn oficojn. Tio estis vere kuraĝa epoko, kiam tio estis absolute malpermesata, ĉefe pro religiaj kaŭzoj. Lia kono do, ne nur estis bazita sur legado de multnombraj libroj, sed li ankaŭ faris eksperimentojn por vidi per si-mem. Tio estas tute simple la moderna metodo de scienco.

Sed li opiniis, ke ne nur medikamentoj estis necesaj por kuraci malsanulon. Li ankaŭ uzis sorĉajn vortojn kaj movojn de la manoj. Ĉu ni revenas al la ridinda aspekto de nia aŭtoro? Plej seriozaj kaj fidindaj personoj asertas, ke Rabelais estis alhemiisto. Sed oni ne devas opinii tial ke li serĉis kaj faris oron... Fakte por Rabelais kaj ĉiuj seriozaj alhemiistoj, tiu « Reĝa Arto » estis senĉesa laboro por sukcesigi ŝanĝon de iu metalo en iun alian, sed precipe por si-mem ŝanĝi per filozofa laboro paralela al la konkreta laboro sur la fornoj. En tiu ŝerĉado la mensuro de la laboranto tiel laboris, kiel la manoj. Nenio povis okazi en la fornoj se la homo, kaj eĉ la ĉirkaŭanta mondo ne reagis kun la bojlanda aŭ la sekiganta materialo.

Oni ja povas dubi pri tiu interago, sed oni ne povas forgesi la spiritostaton, kiun donis tiu teorio por kompreni Rabelais. Laŭ li neniu medikamento kapablis agi sen la helpo de la medicisto. Pli ĝenerale li opiniis, ke la mondo estas unu granda tuto, kies la homa korpo estas malpligrandigita bildo, kaj ke en tiuj mondoj nenio povas okazi sen la helpo de la tuto, kaj sen reago sur ĝi.

Tiu teorio, eldirita per mezepokaj vortoj aspektos ridinda, sed se oni pensas pri la kosmaj rajtoj, kaj pri la ŝanĝoj sur la surfaco de la suno, kiuj tiom agas sur nia vivo, la teorio iĝas tute moderna kaj serioza. Se, plie, oni aŭskultas niajn modernajn psikologojn, kiuj klarigas multajn korpajn malsanojn, kiel nur mensajn malsanojn, oni tiam vidas, ke Rabelais provis kuraci laŭ tre modernaj metodoj.

Sed la surprizoj ankoraŭ ne estas finitaj, kiam oni plulegas la skribojn de Rabelais :

« Celocus asertis, ke la tero vere moviĝas kaj « turniĝas ĉirkaŭ siaj polusoj, ne la ĉielo, kvankam la « kontraŭo saĝnas esti vera. Estante sur la rivero Loi- « re, ŝajnas al ni, ke la proksimaj arboj moviĝas. « Male ili ne moviĝas, sed nin-mem forportas la de- fluo de la boato ».

Por kompreni la gravecon de tiu aserto, oni devas memori, ke Rabelais skribis tion proksimume en 1530, kaj Galileo Galilei devis nei tiun teorion por savi sian vivon en 1633, unu jarcenton poste.

Rabelais estis fakte tre kompetenta astronomo kaj ankaŭ lerta astrologo. Tiu duobla intereso pri la steloj estis tre ofta en tiu epoko, ĉar eĉ la famaj astronomoj Tichobraé kaj Keppler estis oficialaj astrologoj en iliaj landoj. Li eĉ konis multajn manie-



roj por diveni la futuron, kaj li detale priskribas ilin en la 3e libro de « Pantagruel ». En tiu libro li forte primokas tiujn sorĉaĵojn, kaj oni povas kredi, ke li ĉion imagis. Sed pli verŝajne li uzas tiun manieron ĉi-tie kiel en ĉiuj siaj libroj, ĉar li timas, ke tro serioza klarigado estas por li danĝera.

Oni ja povus paroli senfine pri tiu granda figuro de la franca mezepoko. Oni ne povas diri, ke li estis granda artisto ĉar li estis ankaŭ granda sciencisto. Li estis tre lerta medicisto, sed li, la unua, kuraĝis skribi por la popolo en « vulgara » lingvo,

kiu estis la franca lingvo. Tiun lingvon neniu nuntempa franco komprenas, sed al li ni ŝuldas la kreadon de literatura franca lingvo. Fakte la plej simpla metodo por aprezi Rabelais estas legi liajn librojn, en kiuj oni trovas multe por ridi, sed ĉefe por revii kaj pensi. Kaj, ĉar li tiel bone scias reklami por siaj libroj en la Prologo de « Gargantua », ni lasu al li la parolon por fini tiun prezentadon :

« En la Dialogo de Platon, nomita « La Festeno », « Alcibiades, laŭdante sian guverniston Socrates, « diris lin simila al « silenes ». La « silenes » estis « iam skatoletoj similaj al tiuj, kiujn ni vidas nun ĉe « la montrofenestroj de la apotekistoj, pentritaj laŭ « gajaj kaj frivolaj figuroj faritaj por ridigi la publi- « kon. Sed kiam oni malfermis tiujn skatolojn oni « trovis delikataĵojn : balzamon, ambron, moskon, « juvelŝtonojn, kaj aliajn preciozaĵojn.

« Tiel Alcibiades vidis Socrates ; kaj vere se vi « nur kredus la aspekton vi ne nur donus ceperon « por li tiel korpe malbela kaj sintene ridinda li es- « tis. Li havis pintan nazon, frenezan vizaĝon, ktp... « Sed se oni traborus lian eksteran koverton, oni tro- « vus ĉielan kaj senegalan materialon : juĝpovon pli « ol homa, mirindan virtecon, nevenkeblan kuraĝon, « senegalan sobrecon.

« Laŭ vi, kial tiu antaŭprelego ?


« Vi, miaj bonaj disĉiploj kaj aliaj frenezuloj, « kiam vi legas de miaj libroj nur la gajajn titolojn, « vi facile imagas, ke en ili temas nur pri mokaĵoj, « petolaĵoj, kaj gajaj mensogoj ; vi ne serĉas plie ; « vi fidas la eksteran aspekton. Sed vi ne devas tiel « facile taksi la homajn farojn, ĉar, vi-mem diras, « ke la vesto ne faras la monaĥon. Tial, vi devas « malfermi la libron kaj atente konsideri la konclu- « dojn. Tiam vi ekvidos, ke la entenaĵo havas malsa- « man valoron ol tiu, kiun promesis la skatolo. La « vero estas, ke la entenataj temoj ne estas tiom pe- « tolaj ol la titolo kredigas. Ĉu vi neniam vidis hun- « don ekvidantan medolhavan oston ? Platon diras, « ke hundoj estas la plej filozofaj bestoj en la mondo. « Se vi tion vidis, vi povis konstati, kiel li gardas « ĝin, kiel fervore li tenas ĝin, kiel prudente li ek- « mordas ĝin, kiel amene li rompas ĝin, kiel rapide « li suĉas ĝin. Pro kio li tion faras ? Nur pro iom da medolo. Tiu iometo da medolo ja estas pli bonega ol « multe da aliaj aĵoj, ĉar, kiel diras Galien, la me- « dolo estas la plej perfekta aĵo farita de la naturo.

« Kiel tiu hundo, vi devas saĝe flari, taksu tiujn « belajn librojn de alta kvalito kaj valoro. Poste, per « studado kaj ofta meditado, rompi la oston kaj suĉi « la esencan medolon ».

J.-P. GUILLOT.



TOP-SEKRETO DE LA VENENOJ, PLI MURDAJ OL LA H-BOMBO



Kiam Julio Cezaro ekkomencis la konkeron de Gallujo la centestro bezonis kelkiloqraman glavon por ekstermi la kontraŭstarantojn. La apero de Paŭ-Arkistoj-Kompanioj permesis malpliigi la nocan pezon : tiam la sagoj pezis nur kelkajn dekgramojn. La Morto, dank'al la pulvo, igis sin pli kaj pli malpeza : dekgrama kuglo sufiĉas pos neŭtrigi ĉian kontraŭulon. La atombombo, ja, multe pli bone efikas : sen dubo H-bombo — milkilograma — neniigas 500.000 ulojn, kio estas 2 gramoj por unu persono.

Kompreneble, estas ankoraŭ multe tro ; ni memoru, ke plej bonstata atleto povas esti tuj mortigita de nur unu sola miligramo de « tetrodotoksino », alidire, dank'al honesta eta kilogramo da ĝi 1.000.000 da personoj, (Marsejo kaj ĝiaj enloĝantoj) povus malaperi de la mapo.

Ne necesas diri, ke ni ne la unuaj pensis pri tio. Tuj de la naskiĝo de la mikrobiologio, ĉie en la mondo, la militistoj ekintencis supersuti la kontraŭbatalantojn per bakterioj, virusoj, venenoj kaj aliaj toksinoj.

Bedaŭrinde bakteriologia armilo estas nuna realaĵo ; sed ĝi kunportas multajn maloportunaĵojn : la plej grava estas la reiro al la sendinto de la mortigaj bakterioj ; hodiaŭ facile estas semi ĉe la malamikoj terurigan epidemion ; Sed multe pli delikate estas protekti siajn proprajn trupojn kontraŭ epidemio, kiu disvastiĝas sen diferencigi « bonulojn » kaj « malbonulojn ».

Koncerne la venenojn estas tute alie. Longtempe por la potenculoj kaj ilia kunvivantaro, cianido kaj fungoj estis banala armilo, kiu ne interesis la militistojn. Des pli, ke necesas, kvankam malfacile efektiveble, ke la malamiko englutu sufiĉe grandan kvanton da veneno.

Hodiaŭ tio ŝanĝiĝis. La « Sekretaj Oficejoj » pasie interesiĝas pri venenoj. En domoj, ŝajne banalaj, sed reale plen-plenaj je defendiloj kaj gardistoj, kaŝiĝas laboratorioj, en kiuj tage kaj nokte serĉistoj klopodas por sintezi venenojn la plej fortegajn nuntempe konatajn : saksitoksinon aŭ tetrodotoksinon.

Necesas diri, ke depost la cianido aŭ arseno, la venenoj multe evoluis ; jen iu urbo eĉ tre granda :

imagu, ke oni enverŝu en la puran akvon de ĝiaj rezervujoj kelkajn kilogramojn da saksitoksino ; en la daŭro de kelke da tagoj ĉia vivo estus malaperinta. Cetere oni povus autaviĝi, kiamaniere disdoni la venenon : aŭ nebulo helpe de bomboj, aŭ aertavoloj elŝutitaj el aviadilo ; gravas ne la procedo sed nur la necesa, tiel malgranda, kvanto da toksino, kapabla ekstermi ; temas pri miligramo, pezo de unu polvero.

Facile komprenebla estas la rigora sekreto, kiu, sur t.u kampo, ĉirkaŭas militistajn esplorojn. Sintezi organikan venenon estas kolosa tasko, kiu nepre dependas de teknikaj rimedoj disponeblaj nur de kelka tempo.

Aliparte ege multnombraj estas venenoj kaj toksinoj. Plue ilia agmaniero, ilia komponaĵo kaj ilia tokseco ege diferencas.

Kiam oni parolas pri venena besto, oni tuj elvokas la serpenton. Tamen inter la 800 serpent-specioj, kiuj endanĝerigas la homon, neniuj estas tre venena, kompare al kelkaj ranoj, kiuj same kiel fungoj, iĝas mortigaj nur kiam oni ilin manĝas. Tie ĉi estas necese distingi inter venenaj bestoj :

1) tiun, kiuj havas specialan mekanikan aparaton por inokuli la venenon ;

2) la aliajn, kiuj — sen kroĉilo aŭ pikilo — nur « supraĵe » sekrecias la venenon. Al tiu dua kategorio — malmultnombra je individuoj — apartenas kelkaj amfibiuloj, inter, kiuj la ordinara bufo kaj la miriga kolombia rano, kies unu sola ekzemplero permesas al la indiĝenoj venenigi unu kvindekono da sagoj, nepre mortigaj. Kvankam sendanĝera por la homo, la bufo produktas 2 specojn de venenoj t.e. :

- 1) mukozan venenon, sekreciatan de la haŭto ;
- 2) grajnecan venenon eligitan el speco de verukoj.

La mukoza veneno, kies kvanto estas ĝenerale tre malgranda, havas, tuj kiam ĝi eniras la sangon de la vertebruloj, paralizajn karakterojn ; kutime ĝi celas forigi la malamikojn de la bufo.

Kontraŭe, la grajneca veneno estas samtempe abunda kaj potenca. Ĝi, laŭaspekte krema kaj acida, entenas 2 toksajn principojn : unu agantan kiel digitalino, kaj la alia celante mallarĝigi la sangajn anĝiojn.

Per si mem tiu veneno estas sufiĉe fortega. Se oni kunmetus dozojn rikoltitajn sur 10 bufoj oni povus — principe — mortigi homon. Sed tio estus murda ago, ĉar tia, kia ĝi estas, la bufo montriĝas tre sendanĝera por la homo. Apenaŭ ĝi povas inciti la haŭton, eĉ plie la mukozojn ; tio devigas la hundojn lasi ĝin trankvila.

Multe pli kurioza estas la rano de Kolombio, kiun la indiĝenoj nomas « kokoj », sendube pro ĝia krio. Tiu eta rano, kies nigra korpo striita de

flavaj linioj, mezuras apenaŭ 3 centimetrojn, havigis al la Soko-Indianoj la plej ageman sagvenenon.

Doktoroj Daly kaj Witkop entreprenis ekspedicion, speciale malfacilan, pro la denseco de la virga kolombia arbarego kaj la dikeco de la And-murego. Feliĉe la Indianoj alportis grandan helpon al la ĉasistoj. La kokoj-ranoj vivas en la maldensajoj de la arbaro, kaj oni povas ilin malkovri nur aŭdante ilian kanton. Sed, ĉar malofte ili kantas, estis necese dungi infanojn, kiuj tiel perfekte imitas la krion de la ranoj, ke nur tiamaniere oni devigas tiujn ĉi respondi. D-ro Daly sukcesis kolekti 2.400 ranojn. Iliaj haŭtoj traktitaj en laboratorioj donis nur apenaŭ unu trionon da miligramo da veneno. Oni memoru, ke por la Indianoj,


— unu sola ranhaŭto sufiĉas por ŝmiri 50 sagojn,

— unu sago kapablas paralizi beston, tiel rezisteman, kiel leopardo. Oni povas kompreni la eksterordinaran potencon de tiu veneno. Plue ĝi restas agema dum multaj jaroj. Ĝi estas neŭro-muskolo-paralizanto, mortiga, sen ia konata kontraŭveneno; ĝia kemia strukturo estas parte konata kaj oni scias, ke ĝi pareniĝas kun la steroidaj hormonoj. Duobla estas ĝia ago sur la nerva sistemo: unuflanke la toksino interrompas la transmision de la nerva influo al la muskoloj (same kiel la sianido) kaj duaflanke ĝi okazigas koran fibretigon. Provojn oni okazigis sur blankaj musoj; la rezultoj estas jenaj: por la musoj, la batrakotoksino estas mortiga po 2,7 pg/Kg. Tio estas: unu gramo da toksino povas mortigi 7.000.000 da 20 gramaj musoj, en la daŭro de 13'5 minutoj post enperitonea injektado!

Ni forlasu la bestojn, kiuj havas nek kroĉilon nek pikilon.

Do, jen la multaj familioj de tiuj venenaj bestoj, kiuj mordas aŭ pikas. Sur la unua ŝtupo estas la moluskoj; kompreneble nek helikoj, nek limakoj estas venenaj. Sed tute alie estas por kelkaj konkajoj: la famaj Pacifik-konusoj, kies ornama multekonota konko estas nigre makulita, estas kelkfoje mortigaj. En tiuj konkajoj la dentoj de la « radulo » similas harpunon kaj entenas venenglandon. La indiĝenoj de la tropikaj marbordoj multe timas tiujn

konusoj: ne iel ajn ili prenas ilin per la mano. La pikilo facile penetras en la manon kaj tre danĝera estas tiu veneno. Ni ne parolos pri la serpentoj, kies mordo — en Francujo — ne estas mortiga. Sed ĉiu scias, ke tute malsame estas en « varmaj landoj ». Jam en Maroko oni trovas la ruĝajn viperojn, kornvipurojn kaj aliajn minut-serpentojn — ĉiujn timindegajn —. Laŭ kvalita vidpunkto, la serpent-veneno ne estas terurinda: ekzemple tiu de la krotalo estas 30-foje malpli efika ol tiu de la Kolombio-rano.



(El artikolo de R. de la Taille)
Daŭrigota.



APARTE MENCINDA

estas la fakto, ke ĉijare la Foiro de Barcelono eldonis 5000 ekz. de afiŝoj esperantlingvaj.

Ĝi ofertas al ĉiuj geesperantistaj vizitantoj rabatojn en Hispanaj fervojoj, hoteloj en Barcelono kaj Madrido, en muzeoj kaj senpagan eniron en la Foiro. Petu la « Legitimilan ĉarton »:

FOIRO DE BARCELONO
Avenida de Maria Christina
Barcelono 4 - Hispanujo

BLANKA FLORO

(Okaze de 100-jara jubileo, 28-3-1968, de A.-M. Gorkij)

Li eniris neatendite. Altstatura, bone konata laŭ portretoj kaj priskriboj, Gorkij havigis al ĉiuj el ni afablan manpremon.

Poste li sidiĝis apud tablo. Oni montris al li presprovaĵon de l'aperonta moskva revuo « Naŝi dostiĵenija » (Niaj atingoj), kies respondecadaktoro li estis. Gorkij atente trarigardis nur kelkajn kaj faris nemultajn rimarkojn. Parton de l'presprovaĵoj li decidis kunpreni, dirinte :

— Ilin vi ricevos iom pli poste, mi volas konatiĝi kun tiuj eseoj pli detale.

La rimarkoj de l'redaktoro elvokis diskutadon.

Unu ĵurnalisto demandis :

— Aleksej Maksimoviĉ, estu bonvola klarigi, en kiu sin kaŝas sekreto de senerara trovo de plej ĉefa, plej interesa presmaterialo ?

— Ĉi tio estas malfacila - respondis Gorkij - kaj samtempe simpla. Dum la elekto de temo kaj materialo oni devas tute klare prezenti al si la kreocelon. Ne forgesi pri noveco kaj aktualeco, kaj poste koncentrado de l'atento, por ĉion observi larĝe kaj nepre akrevide.

Peniga tuso rompita la parolon.

Gorkij sin levis, alprenis ĉe la buŝo naztukon kaj deiris al fenestro, larĝe malfermita.

— Jen estas ŝcivole — denove ekparolis li — kion vi, ĉiuj ĉe-estantoj, trovos neordinaran kaj rimarkindan en tiu ĉi korto ?

Ni alpaŝis al la fenestro. Ekde alteco de la dua etaĝo estis vidata negranda kvadrato de ĉiuflanke fermita korto. Ĝia asfalto estis superŝuita per diversaj objektoj, senorde disĵetitaj.

Iu ekrapidis : Permesu al mi ?

Nu, nu — diris Gorkij, — komuniku al ni pri via eltrovo, estas interese.

— Ĉu ne tiuj ebonitaj tubetoj ? Ŝajnas, ke ili estas uzablaj, tamen trafis en rubejon...

Iu alia rimarkis pajlan ĉapelon en tiel nekonsvena loko. Ĉiuj esprimis indignon pri tiu blaaj-pejzaĝo.

Mi silentis. Pli juna kaj malsperta, ol aliaj, mi ne supozis partopreni la eksperimenton.

— Kaj vi, — subite Gorkij sin turnis al mi.

Mi estis konfuzita. Certe, ankaŭ mi vidis la eboniton, la ĉapelon kaj haoson en la korto. Sed mian rigardon kaptis io tute alia. Ĉe malhelruĝa brikmuro, inter ŝtonoj, sur asfalto kreskis blanka floro. Ĉi diri pri tio ? Jes ! Kaj mi diris :

— Al mi plaĉas tiu floro.

Ĉiuj tuj alproksimiĝis al la fenestro.

Gorkij ekridetis, karesis per mano siajn lipharojn kaj ekdiris :

« Ĉiu havas propran guston. Ĉiu siaopinie pravas. Sed mi plezurigas, ke ne sole mi rimarkis ĉi tiun floron, kondamnitan por soleco, inter malserenaj ŝtonoj... »

Starante ĉe la fenestro, Aleksej Maksimoviĉ diris per profunde emociiganta voĉo, ke la kombino de floro kaj ŝtono estas temo granda, bela. Ĉi elvokas bonajn sentojn kaj gravajn pensojn.

Floro sur ŝtono — simbolo de lukto, en kiu la vivo konkuras. Trem-delikata, vivoĝoja kreaĵo batalas kontraŭ frida, senemocia kaj senmova ŝtono.

Floro estas la poezio de l'vivo, kaj mem la vivo, eĉ se ĝi estas plej eta, sed vera, liberama, forta kaj kuraĝa, varmigita de la suno.

Ni sincere dankis al Aleksej Maksimoviĉ kaj adiaŭis al li.

Li foriris. Post tiu ĉi renkontiĝo pasis preskaŭ 34 jarojn. Tamen en mia animo freŝe kaj hele restis rava aspekto de tiu granda homo kaj tiu eta blanka floro.

Moskvo, 1968. Aleksandr LOGVIN.

Monologo

LA MORTO DE L'KATO

Mi ĵus verkis teatraĵon... tragedion. Ĉu vi permesas, ke mi legu ĝin laŭte antaŭ vi? Mi esperas, ke ĝi interesos vin. Por ke vi bone komprenu ĝian grandan valoron, mi devas doni al vi kelkajn klarigojn : Mi ne ŝatas longajn teatraĵojn. Ili ofte tedas la publikon ; kaj se, poste, oni volas presigi la verkon, oni ne facile trovas eldononton. Mi do faris la mian tre mallonga : nur tri aktoj.

La antikvaj aŭtoroj, Shakespeare, Gôthe, Corneille, faris siajn tragediojn multe tro longaj. Ili ankaŭ grave eraris, enmetante en ilin multajn personojn. Ĉi tio estas tre ĝena. Se oni ne bone atentis, oni intermiksas la personojn kaj ne plu komprenas la ludadojn. Mi decidis havi en mia tragedio nur tri personojn. Al mi plaĉas la nombro 3.

Por fari la tutan aferon, kiel eble plej mallonga, ĉiu akto havos nur unu scenon. Ni do havos entute tri scenojn, kiuj daŭros kune ĉirkaŭ tri minutojn.

Kiaj estas la tri personoj?

Unue, viro. Li povas esti Germano, Franco, Norvego, Ruso, Hispano aŭ alia, tute egale ; mia tragedio estas internacia kaj povas esti prezentita en iu ajn lando sen ia ŝanĝo. Tiu viro povas esti granda aŭ malgranda, juna aŭ maljuna, riĉa aŭ malriĉa, senbarba aŭ kun longa barbo ; tio tute ne estas grava. Estos do tre facile trovi aktoron por ludi tiun rolon. La dua persono estas virino. Ŝi povas esti Anglino, aŭ Svisino, aŭ Italino, aŭ Japanino, tute egale. Ŝi ankaŭ povas esti alta aŭ malalta, blonda aŭ bruna, bela aŭ malbela. Ne, mi eraras ; ĉar la rolo estas ludota de Esperantistino, ŝi kompreneble estos beleta, gracia kaj ĉarma. Ŝi ne povus esti alia.

Ĉar estas nur unu viro kaj unu virino, ni ne bezonas doni al ili nomojn. Jen ankaŭ ŝatinda plisimpligo : Kelkaj homoj malfacile memoras nomojn ; ili estos kontentaj, ke en mia tragedio troviĝas neniu nomo por memori de la unua ĝis la tria akto.

Ĉetere, se la virino nomiĝus ekzemple, Gretchen, oni tuj pensus, ke la sceno okazas en Germanujo ; se ŝi nomiĝus Ketty, oni pensus, ke ŝi estas Anglino. Sen ia nomo, ŝi estas multe pli internacia kaj pli bone konvenas por esperanta tragedio ludota en iu ajn lando.

Ni do havas viron kaj virinon. Ni nomos ilin, se vi volos, edzo kaj edzino.

Sed la tria persono? La tria persono estas besto.

Ĝi estas kato... aŭ katino ; la sekso havas nenian intereson en la afero. Rimarku, ke la kato estas tre internacia besto : ĝi povas esti belga kato, aŭ portugala kato, aŭ egipta kato, tute egale. Vi povas supozi ĝin nigra, aŭ blanka, aŭ flava, eĉ verda, se vi tion deziras, por plia esperantiĝo. Mi tiel aranĝis la aferon, ke ĉiuj tri personoj aperas en ĉiu akto kaj interparolas. Ne bone estas, kiam unu aktoro staras sola sur la scenejo kaj paroladas, ĉu al si mem, ĉu al la publiko, kiel ekzemple Hamleto :

« ĉu esti aŭ ne esti? tiel staras la demando ».

Tio estas nenatura. Mi ne ŝatas monologojn.

Kiam la kurteno leviĝas, oni tuj vidas niajn tri personojn : la viro, la virino kaj la kato. Kiu parolas unue? Kompreneble, la virino. Kion ŝi diros? Ion sensignifan, sed afablan, ekzemple « Kara kato ». Ŝi ankaŭ povus diri « Kara edzo ! » sed eble la edzo estas malbonhumora kaj respondus ian malĝentilaĵon, kiel « Lasu min trankvila » aŭ « Iru al la diablo », kaj tio malbone impresus la publikon. Pli bone estas, ke ŝi karesas la katon kaj diras « Kara kato ».

Jen la agado komencita. La kato devas ion respondi ; kion ĝi diros? En la tuta vortaro de Kabe, kaj eĉ en la plena vortaro de Grosjean-Maupin, troviĝas nur unu kata vorto : « miaŭ ». Sed tio plene sufiĉas. La kato respondas « Miaŭ ».

Nun estas la vico de la viro paroli. Li devas diri ion rilatan al ĵus aŭdita « miaŭ ». Mi supozas, ke ĝi faris sur lin ne tre agrablan impreson. Li diros « Kia blekemulo ! ». Ĉi tio ne estas tre ĝentila ; sed oni scias ja, ke la viroj ne ĉiam estas ĝentilaj.

Tiel finiĝas la unua sceno kaj la unua akto. Vi vidas, kiel simpla kaj logika ! Ĉiu persono parolas siavice, ĉiu laŭ sia propra naturo kaj karaktero. Estas neniu longa frazo, nenia komplikaĵo. La tuto estos senpene komprenata de la publiko.

Dua akto — La samaj personoj

Ĉar la virino komencis la unuan akton, ne estus juste, se ŝi ankaŭ komencus la duan. Mi tiel bone aranĝis la aferon, ke ĉiu persono komencas unu akton. La edzino komencis la unuan : la kato komencos la duan. Kion ĝi diros?

Mi jam klarigis al vi, ke en la tuta vortaro de Kabe, kaj eĉ en la plena vortaro de Grosjean-Mau-

pin, troviĝas nur unu kata vorto ; ĝi denove diros : « Miaŭ ».

La viro respondos.

Atentu, ke la dua akto tute nature estas post la unua. Kiom da tempo pasis inter la du aktoj, oni ne scias. Povas esti kelkaj tagoj, aŭ kelkaj semajnoj, aŭ kelkaj monatoj, aŭ kelkaj jaroj. Ĉiuokaze, la viro estas pli maljuna, ol en la unua akto ; kaj mi rimarkis, ke malafabla viro, fariĝas ankoraŭ pli malafabla, kiam li fariĝas pli maljuna. Tiel okazas pri mi : ju pli mi maljuniĝas, des pli mi malafabliĝas.

Incitite de la ripetita « miaŭ », la malafabla viro diras : « ĉu ĝi ne silentos ? ».

Li ne sin turnas al la kato ; li ne diras : « Ĉu vi ne silentos ? ». Al sia edzino li sin turnas. Tiel faras la viroj ; se io estas malorda hejme, ili tuj riproĉas la edzinon. Ŝi estas ja la mastrino kaj devas zorgi pri la ordeco, pureco, kaj komforteco de la domo.

La edzino, tiel alparolate, penas restarigi la pacon hejme. Ŝi ĝentile, en konvinka maniero, admonas la katon « Silentu ! ». Kaj tiel finiĝas la dua akto. Ĉu ĝi ne estas simpla, facile komprenata kaj logika ? « Miaŭ — Ĉu ĝi ne silentos ? — Silentu ! ».

Nun la tria kaj lasta akto.

La virino komencis la unuan akton ; la kato la duan, la viro devas komenci la trian.

Atentu, ke la tria akto logike estas post la dua. La viro estas pli maljuna, sekve pli malafabla. Aliflanke, ni povas ja supozi, ke la kato ne obeis la konsilon de la mastrino ; ĝi ne silentis ; ĝi ankoraŭ aŭdigis sian malagraban « miaŭ », kaj tio forte incitis la viron. Li komencas la trian akton, dirante per forta voĉo : « Ĝi estas tiel blekema, kiel vi ». Rimarku, ke li denove alparolas ne la katon, la veran kulpulon, sed sian edzinon ; kaj li ŝin riproĉas en tute malĝentila kaj ofenda maniero. Li eĉ ne parolas korekte ; ĉar la ĝusta esprimo estus : « ĝi (tio estas la kato) estas tiel blekema, kiel vi estas parolema ».

Efektive, la bestoj blekas, sed la homoj parolas. Nur en tre esceptaj okazoj, oni diras pri homoj : ili blekas ; kaj precipe pri esperantistino, oni tute ne povas uzi tiun esprimon.

Tion bone scias la viro ; sed, ĉar li estas tre incitita kaj tre malĝentila, li intence parolas en ofenda maniero.

Nu, lia edzino, kvankam ŝi estas milda, ĝentila, pacienca, pacama, k.t.p. tamen forte sentas la insulton ; ŝi ne povas toleri ĝin, kaj ŝi ekkrias : « Ni tuj vidos, kiu diros la lastan vorton ! ».

Se vi studis la psikologion, aŭ se vi simple observis la virinajn manierojn, vi scias ja, ke tio estas la ĉiama celo de la virino : diri la lastan vorton.

Kiam vi disputas, aŭ simple diskutas kun virino, ŝi tute ne penas vin konvinki, ke ŝi estas prava. Ne. Ŝia plej kara deziro, la celo de ŝiaj klopodoj, estas diri la lastan vorton.

Kompreneble, ŝi ne alparolas sian edzon, sed la katon. La kato blekas, ŝi parolas, kaj ŝi volas diri la lastan vorton. Kiel ŝi atingos tion ? La afero ne estas tre facila. Mi ankaŭ foje interparolis, aŭ interblekis kun mia katino ; ĉiufoje, kiam ĝi diris « miaŭ » mi respondis « miaŭ : « miaŭ-miaŭ ; miaŭ-miaŭ » ; kaj tiel senfine, sed mi ne povis diri la lastan vorton.

La virino devas trovi alian pli taŭgan rimedon por silentigi la katon. Ŝi kaptas ĝin je la kolo kaj premsufokas ĝin.

Kion diros nun la kato ? Kiel vi scias, en la tuta vortaro de Kabe, kaj eĉ en la plena vortaro de Grosjean-Maupin, troviĝas nur unu kata vorto. La kato diras aŭ pli ĝuste penas diri « miaŭ » ; sed prezentu al vi, ke ĝi samtempe estas premsufokata per la kolera mano de la virino ; ĝi do povas diri nur la komencon de la vorto : « mi... » kaj tio estas tre konvena respondo al la virino : « ...kiu diros la lastan vorton ? » — « Mi », kaj tio estas tute vera, ĉar la akto tiel finiĝas, kaj la kato efektive diris la lastan vorton de la tragedio kaj la lastan vorton, aŭ duonvorton de sia vivo.

Tiu sufokiĝo de la kato iom malagrabla impresos la publikon ; sed vi komprenas, ke en tragedio devas nepre esti tragediaj okazaĵoj. Cetere, krom la kato, ĉiuj personoj estas feliĉaj kaj kontentaj ĉe la fino : la viro, ĉar li ne aŭdos plu la incitantan blekadon de la kato ; la edzino tial, ke ŝi nun ĉiam povas diri la lastan vorton ; la publiko estas kontenta, aŭdinte interesan tragedion, ĝi forte aplaŭdas, kaj tio plezurigas la aŭtoron, kiu imagas, ke li faris ĉefverkon.

Ĉu ne ?

Sam MEYER.
(La Revuo 1912-1913)



POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO :

En ĉi tiu numero vi trovos la du lastajn problemojn de via konkurso 67-68.

Mi petas, ke vi bonvolu sendi viajn solvojn, kiel eble plej rapide, por ke ni aperigu la rezultojn en la venonta numero.

Sendu viajn respondojn rekten al :

Sro Pierre Chevalier, 19, bd Gabriel-Lauriol, 44 - Nantes, Francujo.

1) UNUA PROBLEMO (20 poentoj) :

Inter la ĉi subaj frazoj, kelkaj estas korektaj, kelkaj ne. Bonvolu korekti la nekorektajn, sed atentu ! Estos kalkulitaj po 4 poentoj por ĉiu eraro korektita, sed estos forprenitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro aldonita.


- 1) Jam la duan fojon estis donita la signalo per la sonorilo.
- 2) Li tiom laboris, kiom li estas malsana.
- 3) Kion li fariĝis ?
- 4) Mi neas, ke tio estas tiel.
- 5) Povanta ripozi, li preferis labori.
- 6) Inter du potoj staras kaldrono.
- 7) La urbo ekkaptita, la malamikoj foriris.
- 8) Li estas senkulpa, kiel infano ĵus naskiĝanta.
- 9) Oni konfuzas al si la cerbon per miselektitaj legadoj.
- 10) Tio estas farata, sed ne decas estis dirata.

2) DUA PROBLEMO (20 poentoj) :

Sep proverboj.

- 1) Ne doloras la bato sur fremda kapo.
- 2) Peto de barono estas ordo.
- 3) Eĉ la patrino ne komprenas la parolon de muta infano.
- 4) Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.
- 5) Honesta vojo kondukas plej longe.
- 6) Vundo sekreta doloras plej multe.

En la supraj ses proverboj estas kaŝita la sepa proverbo, kiu konsistas el ses vortoj. Ĝia unua vorto estas



en la unua proverbo, ĝia dua vorto en la dua proverbo, kaj tiel plu. Elprenu nun la ses vortojn por ricevi la sepan proverbon, kiel solvon de ĉi tiu konkursa tasko.

3) PLIAJ RESPONDOJ (uzotaj nur por dispartigi la eventualajn ekvalgajnintojn) :

- 1) Kiom da personoj partoprenis la konkurson 67-68 ?
- 2) Al kiom da nacioj apartenas tiuj konkursantoj ?

AMUZAJ PROBLEMOJ

SOLVO DE LA ANTAŬE APERINTAJ PROBLEMOJ :

La du vetkurantoj :

- 1) Estu « l » la longeco de la vojiro.

Tempo de A : l minutoj

$$\frac{l}{300}$$

Tempo de B : $\frac{l}{2 \times 250} + \frac{l}{2 \times 320}$

$$\frac{l}{560} + \frac{l}{640} = \frac{15l}{4480} = \frac{3l}{896}$$

Ni devas kompari $\frac{l}{300}$ kaj $\frac{3l}{896}$

$$\frac{1}{300} = \frac{3}{900} \text{ kaj } \frac{15l}{4480} = \frac{3l}{896}$$

$$990 > 896$$

$$1 \frac{3l}{900} < \frac{3l}{896} \text{ A alvenas la unua.}$$

- 2) Diferenco de la tempo de A kaj B (en minutoj) :

$$\frac{3l}{896} - \frac{l}{300} = \frac{4l}{896 \times 300} = \frac{l}{224 \times 300}$$

$$15 \text{ sekundoj} = \frac{1}{4} \text{ da minuto}$$

$$\frac{l}{224 \times 300} = \frac{1}{4} \text{ Do } l = 224 \times 300 = 56 \times 300 = 16,800$$

Respondo : 16,800 km.

LUDO DE DIFERENCOJ :

La tenilo de kaftaso. La tenilo de la kafkruĉo. La faldo de la tuko sub la brako de la virino. La dekoltaĵo de la virino. La tirkesto. La faldo de la antaŭtuko sub la dekstra mano. La piedo de la ŝranko. La supra parto de la maldekstra antaŭa piedo de la tablo.

NOVAJ PROLEMOJ

TRAMO KAJ PIEDIRANTO :

Piediranto kiu marŝas je 6 kilometroj po unu horo, iros de A al B. Je du kilometroj de A, tramo kiu eliris el A je 10 minutoj post la piediranto, preteriras lin, alvenas al B, kie ĝi restas 10 minutojn kaj reirante de B al A, renkontas denove la piediranton. Jen $11 \frac{1}{3}$ km. inter la du renkontoj.

Kalkulu la distancon AB, inter du haltoj de la tramo.

ĈU VI HAVAS BONAN OKULON ?

El la ĉi kunaj 15 bildoj, 7 havas saman detalon. Kiuj ili estas ?

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Anstataŭ :

« Kiel ĉiu prepozicio, tiel ankaŭ « anstataŭ » per si mem ĉiam postulas la nominativon... »



— Aldonu maldikan anstataŭ la dika.



— La matena poŝtaĵo, Sinjoro. Ili denove sendis « The Daily Worker » anstataŭ « The Daily Mail ».



— Vi eraris, Sinjoro. Pri tiu informo voku oficejon III anstataŭ 110.

« se tamen oni trovas ĉe bonaj aŭtoroj post « anstataŭ » la akuzativon, tiu ĉi lasta estas uzita ne pro la prepozicio, sed pro aliaj cirkonstancoj. Ekzemple en la frazo : « Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilhelmon » la lasta parto de la frazo prezentas nur mallongigon (anstataŭ bati Vilhelmon), kaj la akuzativo forigas ĉiun dubon pri tio, ke anstataŭigita estis ne la batanto sed la batato ».

(Lingvaj respondoj).

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (12 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczy, Nabrezie Metoda 1707/16, PŘEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^o, la, BARCELONO 90 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŢTI - 6.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitan

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

LA VIE DE GRÉSILLON



ENTRE NOUS...

Les activités 1968 ont commencé. Le 4 avril, le château s'est éveillé. Malgré des difficultés concernant le personnel de service, presque introuvable en cette saison, une heure avant l'arrivée des stagiaires l'équipe était complète, grâce aux efforts et aux recherches de quelques amis.

Le nombre de participants à la Semaine Culturelle sera moins important que l'an dernier. A ceci deux raisons : d'abord le Congrès National cette année a lieu aussitôt après la Semaine Culturelle, et de nombreux espérantistes ne peuvent pas faire deux déplacements en deux semaines. Et puis le nombre de « boursiers » d'U.E.F. est très réduit. Manque d'informations ? Manque d'intérêt de la part des groupes locaux ? Il serait dommage de ne pas donner aux jeunes cette chance de participer à une rencontre très intéressante à peu de frais. Quoiqu'il en soit la 6^e Semaine Culturelle ne groupe cette année qu'une soixantaine de personnes. Fort heureusement les jeunes, en grande majorité non boursiers parce qu'âgés de moins de 18 ans, sont tout de même nombreux.

L'Assemblée Générale du 24 mars a mis définitivement au point le programme d'été. Les équipes dirigeantes ont été désignées. Les diverses périodes s'annoncent intéressantes et les inscriptions arrivent. Mais il nous reste, amis, un effort à faire. Il faut que cette année encore le château soit plein pendant l'été. Il le faut d'autant plus que les dépenses de l'année 1967 ont été très grandes. En 1968 rien d'important ne pourra être réalisé. Si vous voulez autant que nous que 1969 ne soit pas une année de stagnation dans le domaine des travaux, il faut que vous veniez nombreux, que vous nous envoyiez vos amis. Venez suivre les cours qui vous permettront, en un temps relativement court, d'atteindre un niveau de connaissances linguistiques tel que vous pourrez profiter pleinement de tout ce que vous offre la pratique de la langue internationale, et feront de vous de vrais espérantophones. Venez mettre au point votre méthode d'enseignement qui vous permettra d'ouvrir un cours dans votre ville ou votre village l'hiver prochain. Venez écouter les conférenciers qui, en développant des sujets qui vous intéresseront au plus haut point, vous montreront que l'Esperanto est une langue à part entière. Ou tout simplement venez passer des vacances dans un milieu sympathique où vous trouverez des contacts enrichissants.

Venez nombreux. Nous avons fait notre possible pour que vous remportiez une moisson de souvenirs agréables.

Pierre BABIN.

LA VIE DE NOTRE REVUE

Merci à tous ceux qui en réglant leur abonnement nous envoient leurs encouragements. Nous faisons notre possible pour vous plaire et vous intéresser. Nous pourrions faire plus si chacun de nos amis nous amenait un nouvel abonné. Pourquoi pas ? Certains l'ont déjà fait.

ABONNÉS BIENFAITEURS 1968

Liste n° 4

M. Pinchedez (Paris)	12 F.
M. Hakermehl (Bas-Rhin)	12 F.
M. Olivaux (Loire-Atlantique)	12 F.
M. Llorens (Drôme)	12 F.
M. Lenel (Côtes-du-Nord)	12 F.
M. Poulain (Pas-de-Calais)	12 F.
Mme Macé (Seine-Maritime)	12 F.
Mme Lacroix (Ile-et-Villaine)	12 F.
M. Moitron (Puy-de-Dôme)	12 F.
M. Hubert (Maine-et-Loire)	12 F.
M. P. Métivier (Maine-et-Loire)	12 F.
Mme Garnier (Allier)	12 F.
Sro Bălănescu (Roumanie)	12 F.
Sro Lenkei (Roumanie)	12 F.
Fno Bonafous (B.-du-R.)	12 F.
M. Carlué (B.-du-R.)	12 F.
M. Mounier Pillet (Isère)	12 F.
Mlle Tissot (Loire)	12 F.
Mme Chaumereuil (Seine-et-Oise)	12 F.
Sro Dimitrov (Bulgarie)	12 F.
Sro Schagen (Pays-Bas)	12 F.
M. Joly-Demol (Somme)	20 F.
M. Fauvel (Val-d'Oise)	12 F.
Mme Villette (Maine-et-Loire)	12 F.
Mme V. Ätänen (B.-du-R.)	12 F.
M. Chagnoux (Allier)	15 F.
Mme Jacquot (Vosges)	24 F.
M. Guillaume (Seine-et-Oise)	12 F.
M. Jacquesson (Sarthe)	12 F.
Mlle Estrade (Seine-St-Denis)	24 F.
M. Watier (Hauts-de-Seine)	12 F.
Mme Dupont (Haute-Garonne)	12 F.
M. Richerataux (Bas-Rhin)	12 F.
M. Tiebaut (Haute-Saône)	12 F.
M. Musereau (Bas-Rhin)	12 F.

M. Turbellier (Loire-Atlantique)	12 F.
M. Iggabel (Mayenne)	12 F.
Foyer Culturel Esperanto (B.-du-R.)	12 F.
Sro Martinez (B.-du-R.)	12 F.
Sro Berret (B.-du-R.)	12 F.
M. Ménard (Maine-et-Loire)	12 F.
Fino Marchand (Maine-et-Loire)	12 F.
M. Simon (Loire-Atlantique)	12 F.
M. Daems (Belgique)	12 F.
Mme Daems (Belgique)	12 F.
M. Eymard (Seine-et-Oise)	12 F.
Mme Hérault (Maine-et-Loire)	15 F.
M. Prevost (Loire-Atlantique)	24 F.
M. Quillaud (Loire-Atlantique)	12 F.
Mme Lavallée (Seine-Maritime)	12 F.
Mme Ferrut (Doubs)	12 F.
M. Martin (Ile-et-Villaine)	12 F.
Mme Humbert Droz (Ile-et-Villaine)	12 F.
M. Selle (Paris)	12 F.
Sro Jakucek (Tchécoslovaquie)	12 F.
Sro Seidler (Tchécoslovaquie)	12 F.
Sro Liekelt (Allemagne DDR)	12 F.
Sro Günther (Hongrie)	12 F.
Mme Martin (Deux-Sèvres)	12 F.

Total 770 F.

VOUS POUVEZ NOUS AIDER

Il ne nous reste plus de timbres de Hongrie. Par contre nous pouvons encore vous procurer des timbres neufs de Tchécoslovaquie, Roumanie, Bulgarie, Pologne, Allemagne de l'Est - Vente à 50 % du tarif Yvert et Tellier. Par lots de 5,00, 10,00, 20,00 - S'adresser à Sino Gilloteaux, 3, allée Béranger 59 - Croix.

NOS JOIES

Nous avons été heureux d'apprendre la naissance le 19 mars de Delphine Omolara Balogun, fille de Monsieur Balogun et de Madame, née Françoise Marchand.

Nos félicitations aux parents et nos meilleurs vœux à Delphine.

Assemblée Générale du 24 Mars 1968

La séance est ouverte à 10 heures sous la présidence de M. Jelenc. Sont présents : MM. et Mmes Babin, Berthelot, Bodereau, Boyet, Cheverry, Ciret, Dairon, Gerrier, Guillaume, J.-P. Guillot, R. Jacquesson, Jelenc, Leterme, Métivier, Micard, Nouais, Pallard, Philippeau, Prévot.

Se sont excusés : MM. et Mmes Baronnet, Chaumereuil, Coussé, Levrard, Maurin, Thébaud, Vazon, Mme Vincent, M. Vincent.

Le nombre de présents et de représentés étant de 199, pour un capital de 54 100,00 francs, le quorum est largement dépassé et il peut être donné suite à l'ordre du jour.

Rapport financier. — En l'absence de M. Coussé, trésorier, M. Babin informe que le total des disponibilités au 31 décembre 1967 était de 48 885,30 francs. De nombreuses factures arrivées en janvier et le reversement Scriber du 1^{er} janvier ont été réglés depuis cette date. Les recettes ont été en augmentation par rapport à l'année précédente sauf au chapitre Cours par Correspondance. Les dépenses d'entretien et d'investissement ont été très grandes.

Des explications sont données par M. Babin sur les différents chapitres du compte d'exploitation et du bilan. Les commissaires aux comptes MM. Berthelot et

Cheverry font leur rapport. Ils témoignent de l'exactitude des comptes. Ils remarquent que l'expert comptable a, dans le bilan, fait une erreur d'addition. Ils donnent quitus.

Des explications données par M. Babin il ressort que le nettoyage de l'étang, rendu possible par l'aide d'un esperantiste dévoué, a coûté plus cher qu'il était prévu sans que ce dépassement soit en définitive exagéré. Les dépenses annexes ont cependant été très élevées.

Il est décidé que la comptabilité de Kulturaj Kaderoj qui n'est pas un bulletin intérieur réservé aux seuls adhérents ne figurera plus au compte d'exploitation de la Maison Culturelle.

Le Bilan et le compte d'exploitation sont alors adoptés à l'unanimité sous réserve que soit corrigée l'erreur commise par l'expert comptable.

Capital social — L'Assemblée enregistre le remboursement de 5 parts d'actionnaires et l'enregistrement de 219 parts nouvelles ce qui porte le capital social à 75 020,00 francs et le nombre de sociétaires à 312.

Résolutions diverses — Il est décidé de continuer à confier la signature auprès des chèques postaux et de la banque aux personnes qui en étaient chargées par les résolutions des années précédentes. Les commissaires

chargés du contrôle de la comptabilité 1968 seront : Mme J. Jacquesson, MM. Berthelot, Cheverry et Prévot. L'expert comptable qui jusqu'alors établissait le bilan ne pouvant plus assurer cette tâche, il est décidé de demander l'assistance d'un esperantiste qualifié.

Rapport d'activité — Cinq cent personnes environ ont séjourné à Grésillon en 1967. Les stages se sont déroulés avec le succès habituel. Le rallye prévu pour la quinzaine internationale n'a pas pu avoir lieu. Il ne semble pas possible qu'on puisse à nouveau envisager un rallye concentration. Cependant le rallye local organisé au cours des Semaines Esperantistes et Culturelles a eu un gros succès et la formule sera conservée. M. Babin signale que le stage qui avait été prévu pour Noël n'a pas pu avoir lieu pour des raisons évidentes d'économie, le groupe de M. Delaire ayant fait défection. Enfin M. Babin donne lecture du rapport de Mme Guillot sur les cours par correspondance. Entre le 19-10-66 et le 20-12-67, 32 demandes de renseignements ont été enregistrées, suivies de 17 inscriptions.

Le rapport d'activité est adopté à l'unanimité.

Election des membres du C.A. et du C.T.

M. Babin donne lecture de la lettre de démission de M. Thébaud qui souligne que seules ses activités à Valenciennes et ses responsabilités à Peuple et Culture l'obligent à cette décision. M. Thébaud avait fait partie de l'équipe fondatrice de la Maison et jusqu'à ces dernières années avait régulièrement guidé un cours à Grésillon. Ce n'est pas sans un très grand regret que l'Assemblée Générale se rend aux raisons de M. Thébaud et enregistre sa démission. M. Thébaud faisait partie de la moitié des membres renouvelable selon les statuts. Les autres membres sortants sont réélus : MM. Bodereau, Guillaume, R. Jacquesson, Jelenc. M. Gerrier est élu au poste laissé vacant par M. Thébaud. Sont élus membres du Conseil technique : MM. Boyet et Métivier, ce dernier plus spécialement chargé des questions agricoles.

Stages 1968 — Les diverses équipes sont mises au point.

4-11 avril : Semaine Culturelle : M. et Mme Jelenc.

11-17 avril : Stage Universités Populaires : M. et Mme Ciret.

20-21 avril : Stage Tourisme et Travail : Mmes Micard et Cheverry.

19 mai : Rencontre Fédérale : M. et Mme Babin, Mme Cheverry.

22-23 juin : Rencontre association : Mme Micard, M. et Mme Guillot.

29 juin-1^{er} juillet : Passage : Mme Micard, Mme Jacquesson.

1^{er} juillet : Cours d'Esperanto par MM. Ribot et Moulin.

Administration : Mme Cheverry, M. et Mme Babin.

21 juillet-4 août : 1^{ere} semaine : Seminario U.E.A.

2^e semaine : Conférences, excursions.

Administration : M. et Mme Guillot, Mlle Leterme.

4-25 août : Cours assurés par Mlle Tomialoje et M. Babin. M. Thierry assurera une mise au point pour les candidats au Pedagogia Atesto. Le professeur du premier cours n'est pas encore désigné. Vannerie et reliure : M. et Mme Dairon. Photographie : Mlle Tomialoje. Administration : M. et Mme Babin, M. Gerrier.

25 août-8 septembre : Stage U.F.E. Cours par M. Ribot.

Administration : M. et Mme Ciret.

Revue : M. Babin fait part de ses difficultés pour « nourrir » régulièrement la revue. Il fait appel aux personnes qui pourraient se charger régulièrement d'une chronique. M. Jacquesson se chargera de la page scientifique.

Faut-il changer la couverture de *Kulturaĵaj Kajejoj* ? Une discussion s'engage à propos de maquette envoyées par Mme Giloteaux. L'Assemblée pense qu'il n'y a pas lieu pour l'instant d'engager la somme nécessaire à cette modification. Elle retient cependant la suggestion de Mme Giloteaux, qu'elle remercie, pour une des années à venir.

Propagande — M. Bodereau expose un plan de propagande basé sur des annonces dans les journaux. Ces annonces devraient permettre d'établir un fichier de personnes intéressées par l'Esperanto auxquelles seraient ensuite proposés cours par correspondance, livres, stages. Une somme de 500,00 francs est attribuée à M. Bodereau pour lui permettre de lancer cette campagne.

Affaires diverses — M. Babin informe l'Assemblée d'une demande émanant d'une société spécialisée dans les cours de langues vivantes par correspondance. Cette société voudrait utiliser la chambre par correspondance de la Maison. Les pourparlers sont en cours par l'intermédiaire de M. Rougetet.

Les seuls travaux envisagés cette année concernent l'entretien : réfection des prairies couvertes par les boues de l'étang, remise en état de la chambre 17, du couloir du premier étage, d'une cheminée de façade, peintures des boxes. Le revêtement de sol de la chambre 22, décidé en octobre sera effectué. Un lavabo supplémentaire sera mis dans la chambre 1 et l'eau installée dans le logement du personnel. Les disponibilités ne permettent pas de dépasser ce programme.

L'ordre du jour étant épuisé la séance est levée à 17 heures.

Le secrétaire de séance : J.P. Guillot.

Ĝenerala Asembleo

(resumo de la protokolo)

Ceestis aŭ estis reprezentitaj 199 membroj por kapitalo 54 100,00 fr. La 31-an de Decembro la disponebla mono estis 48 885,10 fr., sed de post tiu dato malfruaj fakturoj estis pagitaj kaj ankaŭ la repago de la « donaco » Schirber.

En 1967 la enspezoj estis pli grandaj ol la antaŭan jaron krom tiuj de la perkorespondaj kursoj. Sed ankaŭ la elspezoj estis grandaj eĉ grandegaj pro la purigado de la lageto. La bilanco estas unuanime akceptita post raporto de la kontkomisaroj kiuj rimarkigis, ke la kontrevizoro iom eraris en la kalkulo. La nuna kapitalo de la societo estas 75 020,00 fr. kaj la nombro de membroj estas 312.

La raporto pri aktivaĵoj prezentas la diversajn okazintajn periodojn. Tiu raporto estas unuanime akceptita.

Duono de la konsilio estas ŝanĝota. Estas reelektitaj : S-roj Bodereau, Guillaume, Jacquesson R., Jelenc. S-ro Gerrier estas elektita, kiel anstataŭanto de S-ro Thébaud, kiu eksiĝis. S-roj Métivier kaj Boyet estas elektitaj teknikaj konsilianoj.

Poste estas finpretigita la listo de la deĵorantoj par la diversaj periodoj :

1-a somera periodo : S-ino Cheverry, Ges-roj Babin (Kursoj : S-roj Ribot kaj Moulin)

2-a somera periodo : Seminario de U.E.A. kaj prelego-serio Ges-roj Guillot, F-ino Leterme.

3-a somera periodo : Ges-roj Babin, S-ro Gerrier (Kursoj : F-ino Tomialoje, S-ro Thierry, S-ro Babin ; fotoarto : F-ino Tomialoje ; bindado : S-ro Dairon ; korbofarado : S-ino Dairon).

4-a somera periodo : Ges-roj Ciret (Kursoj : S-ro Ribot).

Parolante pri Kulturaj Kajejoj S-ro Babin petas, ke amikoj bonvole respondecu pri unu aŭ du paĝoj. S-ro Jacquesson promesas sendi sciencajn artikolojn.

S-ino Giloteaux proponas ŝanĝon de la kovrilo de la revuo. La Ĝenerala Asembleo ne opinias oportuna tuĵan ŝanĝon sed decidas konservi la projektojn senditajn de S-ino Giloteaux.

S-ro Bodereau prezentas projekton de propagando per anoncoj en gazetoj starigo de adres-sliparo kaj ekspluatado de tiu sliparo. Sumo de 500,00 fr. estas disponigita al S-ro Bodereau por lanĉi tiu propagandon.

La antaŭviditaj laboroj en la bieno estas ĉijare limigitaj je la necesaj riparoj aŭ plibonigoj. Iu ajn aĉeto de nova materialo ne estas ebla.

SERVICE - LIBRAIRIE

Adresser votre commande et votre chèque de paiement au nom de : M.C.E. 1485-39 Nantes, à :

M. GUILLOT, lotissement Deshoullières, route de Limoges, 86 - POITIERS

Nos prix sont indiqués fran co de port à partir de 5 F.

LIVRES D'ETUDE

Esperanto manuel, par Warnier	8,00
Esperanto por infanoj	3,00
Junulkurso par S.A.T. amikaro	7,00
Ni parolu en esperanto, de A. Ribot	4,00
Por la praktikantoj, de P. Babin	8,50

DICTIONNAIRES

Vocabulaire de poche, de Bastien	3,30
Dictionnaire pratique (S.A.T.)	13,80
Dictionnaire Français-Esperanto, de Léger et Albault	22,00
Grand dictionnaire Esperanto-Français, de Waringhien	34,50
Plena vortaro, par S.A.T.	17,00

DISQUES

Tra la mondo : 6 disques, 7 livrets, 1 Précis grammatical de A. Ribot, le tout	86,70
6 disques seuls	42,00
7 livrets seuls	48,00
Junul - Kurso - 5 diskoj por kompletigi la lerno-libron	12,00

LIVRES POUR ENFANTS

1 livre	1,12
La série de 10 livres	10,00

HISTOIRE DE LA LANGUE ET DU MOUVEMENT

Lexique fondamental, par Léger	6,50
Aventuroj de pioniro, de E. Privat	9,00
Dialekto dialektiko, de Dalmau.....	4,00
Esperanto, fil d'Ariane, de P. Delaire	12,50
Fundamento de Esperanto	rel. 18,20
bro.	13,70
Fundamenta krestomatio	17,50
Historio de la lingvo esperanto, de E. Privat ..	10,50
Lingvo kaj vivo, de Waringhien	20,00
Lingvaj respondoj, de L.L. Zamenhof .. rel.	11,00
bro.	8,20
Planlingvaj problemoj, de W. Gilbert	6,00
Proverbaro esperanta	8,00
La zamenhofa esperanto	20,00
Le Docteur Esperanto, de Maria Ziolkowska	rel. 14,10
bro.	6,95
Retoriko de Lapenna	17,00
Vivo de Zamenhof, de E. Privat	8,00
Zamenhof, aŭtoro de Esperanto, de M. Boulton Vindiana, notre patrie préhistorique retrouvée par Petro Stojan	17,00
1,00	

ROMANS

Bill kaj Lazuraj okuloj aŭ du kuleretoj da ĉielo de Atus Goldoni. Lina Gabrielli	4,50
La eta princo, de A. de Saint-Exupéry	13,00
Fabeloj de Andersen	15,00
Frisaj rakontoj en esperanto de diversaj aŭtoroj	9,50
Homoj kaj riveroj, de J.H. Rosbach	9,50
Homoj sur la tero de S. Engholm	12,00
rel.	16,00
Infanoj en Torento, de S. Engholm (2 vol.) ..	4,50
Kiel akvo de l'rivero, de R. Schwartz	17,00
Koloroj, de Julio Baghy	4,00
La kombilo de Lina Gabrielli	4,50
Kredu min, Sinjorino, de C. Rossetti	10,00

Malsata ŝtono, de R. Tagore	13,00
La marvirineto, de Andersen	12,00
Tiel okazis aŭ Mistero minoza, de F. Szilagy ..	9,50
La naŭzo, de J.-P. Sartre	rel. 20,50
bro.	17,50
Normandaj rakontoj, de Maupassant	18,00
Quo vadis, de H. Sienkiewicz	12,00
Sen eliro et La respektema p..., de Sartre	8,60
Specimene, de H. Beaupierre	8,00
Taglibro, de A. Frank	11,00
33 rakontoj. La esperanta novelarto	17,00
La verda raketo, de Jean Forge	12,00
Vivo kaj opinioj, de Majstro M'saud, de Jean Robillard	7,50
Novaj vestoj de la imperiestro de Andersen ..	12,00
Maŝinmondo de Szathmari	7,50
Sen paraŝuto de Poul Thorsen	6,00
Sub stelo rigida de Porsteinn Fra Hamri	6,00

Et de nombreux autres ouvrages non mentionnés.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1^{er} degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2^e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3^e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Maison Culturelle Espérantiste

Renseignements :
Château de Grésillon
49 - BAUGÉ

Tél. 34